

BELGA ESPERANTISTO

47a Jaro — N-ro 9a — Novembro-December 1955a

Fondita
en 1908a



Abonprezo:
Fr. 100,-

Redaktoro-Administranto:
la Prezidanto de R.B.L.E.:

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44

Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,

aliĝanta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

E.-RENESEANCO EN ORIENTA EŬROPO

Estas tre interesa kaj ĝojiga fakto, ke Esperanto malantaŭ la fera kurteno reviviĝas. Ni povas tion konstati el diversaj fenomenoj, kiujn ni tuj notos. Sed antaŭe ni volas fiksi la elirpunkton. En Sovjetunio Esperanto estis tre favorata en la dudek-jaroj, mi mem havis tiam diversajn korespondantojn eĉ en pli ol unu el la sovjetaj respublikoj, sed de post la jaro 1936, kiam okazis la grandaj stalinaj purigaj politikaj, en kiuj la diktatoro persekutis ĉiujn homojn, kiuj havis iun konekton kun eksterlando (kosmopolitismo oni tion tiam komencis nomi), Esperanto komplete malaperis. Tamen ni kompreneble povas supozi, ke la lingvo ne tute elmortis, nur la publika propagando estis komplete malhelpita.

Kiam la t.n. satelitaj landoj en orienta Eŭropo venis post la milito sub rusan „influan“, la pozicio de Esperanto ankaŭ endanĝerigis. En la unuaj jaroj post 1945 ĝi ankoraŭ ne tiom suferis, en Budapeŝto aperis „Literatura Mondo“, en Bulgarujo „Internacia Kulturo“, sed ju pli forta fariĝis la premo de la stalinismo en tiuj landoj des pli malfortiĝis Esperanto. 1950–53 estis la plej malhelaj jaroj. Tamen Esperanto povis ankoraŭ vivteni sin iom, en Polujo ĉiam ekzistis la Asocio de Esperantistoj en Pollando, kaj en Ĉeĥoslovakujo lokaj societoj daŭrigis sian laboron, plej laŭdirinde eble la grupo de Brno, kiu konservis sian altan kulturon nivelon. Ankaŭ la feriaj kursoj en Doksy daŭris. Esperantistoj serĉante elvojon metis E. en la servon de la pacmovado. S-ro R. Burda eldonis ĝis hodiaŭ 44 numerojn de ciklostilita bulteno „La Pacdefendanto“, kiu estis valora ankaŭ sur la kampo de la por-esperanta laboro. Pri la politika flanko de tiu afero mi nun ne volas paroli.

Post la morto de Stalin kun la kreskanta malstreĉiĝo de la premo, kiu subigis ĉiujn komunistajn popolojn, malfermiĝis ankaŭ por Esperanto novaj eblecoj. Plej sensacia el ĉio estas la informo, ke Esperanto denove estas

vivanta fakto en Sovjetunio. En la komenco de ĉi tiu jaro publikigis „La Pacdefendanto“ leteron de rusa lingvisto, E. Bokarev, kiu interesiĝis pri Esperantaĵoj. Li ricevis pli ol cent leterojn kaj presajojn el multaj landoj. „La pacdefendanto“ en sia numero de julio-aŭgusto represas leteron de Bokarev, en kiu tiu skribas vorte: „La 18an de junio 1955 en kunsido la literatura kaj lingva fakto de la Scienca Akademio en Moskvo decidis pri fondo de Sovjetunia Esperanto-Asocio, kiu funkcios en la kadro de la Scienca Akademio. (sekvas la nomoj de kelkaj rusaj sciencistoj kiuj apogis tiun decidon). La organiza komitato preparos statuton por la asocio kaj planos la laboron: eldono de revuo, literaturo, propagando por paco, fondo de filioj ktp. Ni ĉie renkontas aprobon kaj helpon. La legendo, ke Esperanto en Sovjetunio ĝenerale estas malaprobata estas malĝusta.“ Tiu informo certe estas ege interesa kaj valora.

En Ĉeĥoslovakio la pli libera aero etligis al la Esperantistoj organizi 1955 la unuan tutŝtatan kunvenon (ni dirus landan kongreson). Tiu okazis en Otovice sub la devizo „per Esperanto por la mondpaco“ la 7-11ajn de julio kun partopreno de pli ol 300 personoj. La plej grava rezulto de la kongreso estis la fondo de „Tutŝtata Esperantista Konsulta Komitato“ (tio korespondas al la estraro de landa asocio) por kunordigi la diversajn klubojn kaj rondetojn. Ĝia prezidanto estas la tre konata Esperantisto Josef Vitek. La rezolucio, en kiu troviĝas ankaŭ multe da politiko, aperis presita kaj estas subskribita de Burda kaj Vitek.

Ankaŭ en Bulgarujo aperis denove gazeto, ciklostilita bulteno de la Bulgara Esperantista Asocio kaj de Bulgara Esperantista Kooperativo. En ĝi ni legas, ke al la packongreso en Helsinko vojaĝis oficiala reprezentanto de la BEA, al kiu la ŝtato pagis ĉiujn vojaĝelspezojn.

En Pollando du reprezentantoj de

la Pola Esperantista Asocio eĉ ricevis pasportojn kaj devizojn(!) por vojaĝi al la UK en Bologna. Tre bedaŭrinde ili ne ekhavis ĝustatempe la italan vizon. El Hungarujo ni scias nenion pri Esperantista Organizo, sed ni scias ke unuopuloj kiel s-ro Balkanyi ankoraŭ laboras por kaj per Esperanto, kaj Kalocsay denove verkas. La Komuna Konversacio Klubo en Kopenhago (Randbölvej 4) planas eldoni la plej novan verkaron de Kolomano Kalocsay, silentinta dum ok jaroj en printempo 1956. Ĝi nun kolektas frumendojn por tiu libro, kiu havos 112-120 paĝojn kaj portas la titolon „Ezopa Saĝo, sepdeksef fabloj verse reverkitaj de K. Kalocsay“. (Prezo por frumendadoj ĝis la fino de 1955: 9 danaj kronoj). Pri landa organizo de hungaraj esperantistoj aŭ pri bulteno ni scias nenion, sed ni povas diri, ke ni sporade ricevas korespondadojn en Esperanto el Polujo, Ĉeĥoslovakujo, Hunjarujo kaj Bulgarujo. La Budapeŝta Radio faris la 27an de julio intervjuon kun s-ro Pal Balkanyi en la kadro de siaj finlingvaj elsendoj pri lia peresperanta paclaboro. Kvankam tia unuopa elsendo laŭsperte perdiĝas en la maro de la ondoj, ĝi estas tre grava kiel fenomeno, ĉar ĝi ne estus ebla, se ne la ĝenerala sinteno al Esperanto estus fariĝinta pli favora aŭ almenaŭ malpli malfavora. Sole el Rumanujo kaj Albanujo ni ĝis nun tute nenion aŭdis pri Esperanto, sed en tiuj landoj la movado jam antaŭ la ŝanĝo de la reĝimo estis tre malforta, do tiu silento signifas nenion specialan.

Estas kompreneble ke ni en okcidento kun kontenteco registras la revivigon de Esperanto en orienteŭropaj landoj. La ideo de Esperanto havas en si la universalecon kaj estas kontraŭmonopola. Pro tio ni senkonsidere de politika diverseco salutas la Esperantistojn novajn aŭ reaparantajn en oriento kaj esperas, ke Esperanto servos al ili ne nur kiel ilo por komuniste kolorigita paco, sed helpu al efektiva proksimigo de popoloj vivantaj sub la signo de malsamaj poliikaj sistemoj.

A. B.

R.B.L.E.

Administrantaraj kunsidoj

La administrantaro de R.B.L.E. kunvenis en Bruselo la sabatojn, 24an de septembro kaj 19an de novembro kaj ekzamenis la diversajn punktojn, kiuj rilatas al la nacia kaj internacia movadoj kaj speciale al la situacio en U.E.A.

Dum la unua, estis unuanime decidite provizore, ne oficialigi la elekton de S-ro Jaumotte, kiel komitatano, anstataŭanto de D-ro Kempeneers, kiu eksigis.

La elektito kaj la membroj de la administrantaro efektive deziris ankoraŭ pripensi la internacian situacion, kreitan per la diversaj ŝanĝoj kaj eksigoj en la estraro de U.E.A. kaj pri kiuj ni aludis en la lasta numero de nia revuo.

Dum la dua kunsido, la administrantaro kun la sama unuanimeco decidis normaligi la ĉi supran elekton de S-ro Jaumotte, kiel komitatano, reprezentanto de R.B.L.E. en U.E.A. kaj tiu elekto do estos oficiale konfirmata al la estraro.

La administrantaro esperas ke, malgraŭ la tre malagrablaj okazintaĵoj de la lastaj monataj kaj malgraŭ la eksigoj kaj ŝanĝoj, U.E.A., unufoje pli, kapablos venki la krizon kaj komisiis la novan komitatanon tre vigle atenti pri la okazantaĵoj.

La situacio en nia lando mem ali-

Esperanto antaŭ la Eŭropa Konsilantaro

Komence de la aŭtuna sesio de la Eŭropa Konsulta Asembleo niaj s-anoj D-ro Herrmann, (Germanujo), L. Laurat, kaj P. Petit (ambaŭ el Francujo) estis en Strasburgo kaj sukcesis akiri la subskribojn de 14 delegitoj el Anglujo, Francujo, Germanujo, Italujo kaj Norvegujo sub propono de nova rekomendo pri la lingvo-problemo.

Por ke la Eŭropa Konsilantaro povu

flanke bone evoluas: Niaj du plej gravaj grupoj, de Antverpeno kaj Bruĝo, pligrandigis konsiderinde sian membraron, dum tri aŭ kvar aliaj, kiuj ne povis konservi entute sian membro-nombro, tamen atingis procenton tre apuda al cent.

La administrantaro aprobis la kunmeton de la L.K.K. por nia Jubilea Kongreso en Gento.

Je la komenciĝo de la lasta kunsido, la membroj estis rektstarante aŭskultintaj la kondolencajn vortojn de la prezidanto, memore al nia bedaŭrata kunlaboranto kaj bona amiko S-ro Clotaire Vandeveld, same kiel al S-ro Brihay, kiu, kvankam ne efektiva membro de la administrantaro, tamen, kiel privata sekretario de D-ro Kempeneers, faris dum multaj jaroj, grandajn servojn al ĝi kaj al nia Ligo.

S-ro Clotaire Vandeveld mortis

Reĝa Belga Ligo Esperantista funebras pro la morto, je la aĝo de 81 jaroj, de sia iama Generala Sekretario S-ro Clotaire Vandeveld, ingeniero, kiu, ĝis la lasta momento kaj malgraŭ longa malsano, kiu tamen subite pli-graviĝis, tiel ke la morto restis surprizo, estis la prezidanto de nia Genta Sekcio, en kiu li estis reprezentanta la rolon de tiu alia antaŭa Generala Sekretario de nia Ligo, S-ro Henri Petiau.

S-ro Vandeveld havis la feliĉon, ke lia kunulino, la aminda sinjorino Vandeveld, ne estas nur fidela membrino de niaj grupoj kaj ligo, sed estis ankaŭ por li efektiva kunhelpantino, kiu en la lastaj jaroj eĉ anstataŭis lin en diversaj taskoj, kiujn li mem ne plu plene povis plenumi, i.a. en la instruado de nia lingvo.

Dum la lasta Kongreso, kiun li ĉeestis, lia raŭka voĉo jam ne plu permesis al li legi mem sian raporton pri la ĝenerala agado de la Ligo, raporton kiu estis ĉiam la portanto de bonaj konsiloj.

Fortvole, li tamen kunsidadis ĉe la estrara tablo.

Diversaj el niaj diplomitaj profesoroj

roj memoros kun dankemo la membron de la Juĝantaro, en kiu S-ro Vandeveld jam de multaj jaroj kunsidis.

S-ro Vandeveld estis por ĉiuj, kiuj lin konis, bona, sincera amiko, kiu de 1915, — tio estas antaŭ pli ol 40 jaroj —, aliĝis al nia movado kaj kiu certe estis unu el la plej malnovaj pioniroj ankoraŭ funkcia en la movado.

Ĉe lia ĉerko, nia Liga Prezidanto — en ĉeesto de gvidantoj kaj membroj de diversaj Grupoj, inter kiuj, — krom la Gentojanoj, — ni rimarkis la administrantojn de nia Ligo: S-ro H. Sielens, ĝeneralan Sekretarion, S-ro C. Poupeye kun edzino kaj S-ro G. Van den Bossche —, diris al S-ro Vandeveld, al la filo Paul kaj al aliaj familianoj, la koran esprimon de profunda kunsento ĉe la foriro de tiu, en kies domo, — antaŭ apenaŭ kelkaj tagoj, stariĝis la L.K.K. por la Genta Kongreso, kies pro honora prezidanto, li ankoraŭ bonvole akceptis esti.

Ni rediras tie ĉi la kondolencojn de la tuta belga movado.

B.E.

ekzameni, ĉu Esperanto eble donos elvojon el la lingvaj malfacilaĵoj, oni proponas, kiel eksperimenton, la oficialan instruadon de Esperanto en po unu klaso kun lernantoj de 11 ĝis 14 jaroj en Britujo, Francujo, Germanujo, Italujo kaj Nederlando. Post unu jaro de studado, la lernantoj estu ekzamenataj en Strasburgo.

La 25an de oktobro konsiderinte la aferon, la Konsulta Asembleo decidis sendi la proponon al la kompetenta Komitato por Kulturaj kaj Sciencaj Demandoj por prepara pritraktado.

La Konsulta Asembleo verŝajne jam dum la maja sesio 1956 definitive decidis pri la rekomendo.

Ni esperas, ke estos eble dum tiu sesio montri ankaŭ la faman Esperanto-Ekspozicion de Montevideo en Strasburgo.

Pri la plua evoluo de tiu tre grava afero la esperantista publiko ĝustatempe ricevos la necesajn informojn. Ni urĝe petas niajn gesamideanojn, ke ili ne ĝenu iun ajn oficialajn instancojn aŭ personojn sen komisiio de la estraro de nia Ligo.

Jen la teksto de la suprealudita rekomendo:

La Konsulta Asembleo, konsiderante

1e) ke la lingvaj malfacilaĵoj malhelpas al pli bona interkompreniĝo inter la Eŭropaj popoloj, kaj samtempe al la disvastiĝo de Eŭropa solidareco;

2e) ke la internacia lingvo Esperanto, pro sia facileco kaj sia neŭtrala politika neŭtraleco, estus eble akceptebla solvo por malpligrandigi en Eŭropo la malhelpaĵoj de la lingvoj;

Rekomendas al la Komitato de la Ministroj la eksperimentan organizadon, en klaso de volontuloj, de oficiala instruado de la internacia lingvo Esperanto (lernantoj deklariĝis deklariĝi) en unu lernejo de ĉiu el la sekvantaj membro-ŝtatoj: Germanujo, Francujo, Britujo, Italujo, Nederlando (N.d.l.R.); Oni elektis kvin landojn kun kvin diversaj lingvoj).

Post unu jaro da studado, la lernantoj estos kunigitaj en Strasbourg. La kultura Komisiono de la Eŭropa Konsilantaro prezentos al la Konsulta Asembleo raporton pri la akiritaj rezultoj.

Subskribis:

- Britujo: S-oj JONES, POPPLEWELL, THOMSON.
- Francujo: S-oj Yvon DELBOS, BICHET, de FELICE, PINTON.
- Germanujo: S-roj ERLER, LUT-KENS, S-inoj REHLING, WEBER.
- Italujo: D-ro EBNER, S-ro BOGGIANO PICO.
- Norvegujo: S-ro STROM.

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Brnylnaan, 44, Wiirijk.

Vicprezidanto-Kasisto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.

Vicprezidentino: S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.

Ĝenerala Sekretario: S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo“, Falcon-rul, 21, Antverpeno.

(Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo“

(Poŝtĉeknumero: 726.54)

La 26an de aŭgusto karavano de 30 britoj vizitis la grupon. La gvidanto, S-ro Williams, helpata de S-ro R. Van Eynde ĉe la filmaparato, prezentis du belegajn koloritajn filmojn memverkitajn kaj kun komentarioj pri kolektivaj vojaĝoj tra Eŭropo. Li akiris varman aplaŭdon kune kun la laŭdo de la Prezidanto, kiu substrekis la utilecon kaj la valoron de tiaj filmoj en ne-esperantistaj medioj. S-ino L. Bernaerts kompletigis la programon per amuza raporto pri la Universala Kongreso en Bolonjo.

La 2an de septembro (kunveno kiun S-ro R. Balleux prezidis) S-ino J. De Hondt detale raportis pri sia vojaĝo al la U.K. en Italujo. Amaso da lumbildoj agrablis tiun lertan paroladon kiu vigle estis aplaŭdata. Ĉar ankaŭ estis parolata ĵurnalo F-ino B. Geers kaj S-ino R. Lecat havis la okazon por legi siajn tekstojn.

La 9an F-ino M. Hofkens, S-roj K. Amerijckx kaj A. Verhoeven raportis tre bonhumore pri sia libertempo kaj la 16an S-ro Maur. Jaumotte paroladis pri „La plej ekscitiga regiono de l'terglobo — Centro de Francujo (Massif Central.) La belegaj multnombraj lumbildoj prezentitaj kaj la amaso da detaloj diskonigitaj per tiu fama bonkonata prezidanta voĉo faris de tiu parolado plej sukcesplenan programon.

Dimanĉon la 18an — posttagmeze — pli ol 20 verdstelanoj vizitis la laborejon de la skulptisto S-ro F. Everaerts, la artisto kiu jam verkis por la grupo la buston de D-ro Zamenhof. Akceptita laŭ tre afabla maniero la vizitantoj havis okazon vivi dum kelkaj horoj en vere artista atmosfero kun amaso da klarigoj kaj sciindaĵoj pri la bela

skulptarto. Malgraŭ la aŭtuna vetero, la promenado al la „Cijnshoeve“ kaj la tre bela regiona kapeleto kun komentario de la gastiganto, estis ŝatata de ĉiu membro — en escepto. Konsekvence la dankvortoj de S-ro M. Jaumotte estis varmaj kaj elkoraj. Lundon la 19an, S-ro M. De Ketelaere komencis la elementan kurson. Bedaŭrinde, eble pro kuniĝo de diversaj cirkonstancoj, la rezulto ne estas plene kontentiga.

La 23an S-ro J. Verstraeten enkondukis vigan diskutvesperon „Filmo aŭ teatro“ kaj la 30an la serio de libertempaj raportoj estis konkludata de S-ro R. Balleux per sia vojaĝo al „Insulo Texel“ kaj de S-ro J. Verstraeten per antaŭlego el libro. Disaŭdigo de propaganda paroladeto pri „Esperanto“ de S-ro M. Jaumotte kiun li elparolis en Radio Antverpeno, vekis vigan aplaŭdon (teknikaj aranĝoj de S-ro J. Montmirail).

La 7an de oktobro la parolata ĵurnalo havis sian kutiman sukceson.

Dimanĉon la 9an posttagmeze proksimume 30 membroj sub gvido de S-ro Paesmans vizitis la katedraĵon de Antverpeno kaj entuziasmiĝis pro la amplekso da nekonataj detaloj, kiujn la gvidanto montris aŭ indikis dum preskaŭ 2 hora rondirado. S-ro M. de Ketelaere plenumis la agrablan taskon danki la gvidanton.

La 14an, F-ino L. De Winter enkondukis debatvesperon „Konfektio aŭ vestaĵoj laŭ mezuro“ — temo kiu manifestigis la plej diversajn opiniojn kaj dimanĉon la 16an malgraŭ la iom malvarma vetero denove S-ro F. Everaerts (la skulptisto) gvidadis 30 membrojn tra la 2jara Ekspozicio de Skulptarto en Middelheimparko. La multaj klarigoj de kompetentulo multe vekis la atenton kaj la intereson de la ĉeestantoj en kies nomo S-ro M. Jaumotte sub spontanea aplaŭdo, varme dankis. Oni konkludis tiun promenadon per varmiganta taso da kafo en apuda trinksalono.

La 21an en la „Kelo de Billard Palace“, Koningin Astridplaco, la ĉiujara mitulvespermanĝo estis organizata. La menuo estis ŝatata de ĉiuj kaj kelkaj el la membroj ĉu per kanto, ĉu per pianoludo agrablis tiun festenon, kiu nur malfrue finiĝis.

Programo de la venontaj kunsidoj:

Ĉiuvendrede en „Witte Lecuw“, Frankrijk 4, je la 20,30a h. (La etaĝo).

Por sia vintra provizo

Por sia antracita karbo

la Esperantistoj mendas

ĉe

BELGOMINE

FRANKRIJKLEI, 20

ANTVERPENO

kiu donas specialan premion

Novembro: La 4an: Parolata ĵurnalo; la 11an: pro la Nacia Tago ne kunveno; la 18an: Teatra Elsendaĵo; la 25an: Parolado de S-ro Roger Jaumotte pri „Trafiko“.

Decembro: La 2an: Parolata ĵurnalo kun Sankta Nikolaa programo; la 9an: Parolado de S-ro Th. Van Gindertaelen; la 16an: ZAMENHOFA VESPERO; la 23an: Kristnaska atmosfero kun lotumado; la 30an: Rerigardo de la jaro.

Januaro: Ni atentigas jam de nun, ke la JARFESTENO okazos la dimanĉon, 22an de Januaro 1956. Ĉiu jam notu. La prezo estos Fr. 125, servado enkalkulata.

FAMILIA VIVO

Geedziĝo

La 29an de oktobro geedziĝis en Antverpeno du bonaj gemembroj de la Grupo „La Verda Stelo“: F-ino Henny De Ketelaere, la sindonema profesorino de la Grupo filino de nia malnova amiko S-ro Morris De Ketelaere, kaj S-ro Hugo Jacques, ankaŭ fidela membro, en kiu la juna edzino tre certe trovos apoganton ankaŭ sur la movada tereno.

Ni rediras tie ĉi la korajn gratulojn, kiujn jam alportis al ili, en la granda festa tago, la prezidanto de la Grupo kaj de la Ligo, en kies rangoj estas ankaŭ bone konata la unua laŭreatino de la oratoraj konkuroj dum niaj kongresoj.

Naskiĝo

Nia amiko S-ro Morris De Ketelaere ĝuis la feliĉon, en tre mallonga tempospaco iĝi dufoje avo, pro naskiĝo de Kristin, filineto de la bonaj gemembroj G-roj Tytgat De Ketelaere. La patrino, ĉies amikino Paula kaj la infano bone fartas.

Kaj de Karla, kiu feliĉiĝis per sia naskiĝo en Kongolando, tiun alian paron De Ketelaere-Jacques, do la fraton de Henny, Paula kaj Johanna, kaj la fratinon de la jus edziĝinta Hugo Jacques.

Al avo, gepatroj kaj geonkloj niajn plej sincerajn gratulojn.

Malsano

Kiam en la monato de septembro, nia veterano S-ro Jan Jacobs volis fari en „La (Sekvo sur paĝo 70)

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16

ANTVERPENO

— Por via MUZIKO
RADIO kaj GRAMOFONO

NEOLOGISMOLOGIO de RETO ROSSETTI

En vespero teda, laca, kun
humoro erinaca, pri l'
problem' neologisma pri
meditis en torpor'.
Cu la lingvo rajtas riĉi, aŭ
per jama stok' sufici
kaj modeste rezigniĝi pri la
altedifa glor' ?
En dilemo pri l' problemo
pensis mi kun anatemo.
ke la homoj por la kremoj ne
moviĝos el langvor'...
„Klapelkapo” mi decidis „solvos
la dilemon for.
Klapelkap la profesor” !

Do minskue kaj senplue mi la ĉambron lasis brue por viziti ĉi amikon kun la saĝo de Nestor... Al diablo! — sen kapablo estas mi por min elŝiri el la — mekanika rondo de ĉi tiu eterne muelanta metriko! Al la proz', proz', proz', proz' — ha, suface! Sobre, sobre, mia kap! Via temo estas lingva, eske sekca — jam eligu el la halucino!

Mi trovis la profesoron ĉe lia larĝa skribotablo garnita per tri telefonoj, ĉiu ŝtopita per ĉirkaŭvindita poŝtuko. En profunde absorbiĝo Klapelkap miksis „Lexicon”-kartojn kaj disjetis ilin sur la tabloplaton.

Li ne rimarkis mian eniron. Lia rigardo estis alforĝita al forfikulo, kiu ĝuste trarampis sur la tablo. Nerve li elektis kaj jetis sur la tablon la literkartojn.

FORFIKULO

Tiam li balais la naŭ kartojn en la manon, remiksis ilin kaj denove dismetis. Ili eliris jene:

FIFORKULO

Kun raŭka krio de triumfo la profesoro levis la okulojn kaj ekvidis min, kiu staris tie iom ĝenite kaj pli ol iom mirante.

„Ha, juna amiko” li raspis, vi venis ĝustatempe por atesti la grandiozan malkovron, kiun mi ĵus faris! Mi estas ĉe la sojlo de nova Ameriko! Mi trovis la bazon por nova scienco. la Neologismo! ”

„La Neo — ?” mi balbutis. Mi ne riskis ripeti la abrakadabron, kiun la profesoro tiel lerte ĝuglis.

„Jes!” kriis Klapelkap, „la Neologismo! La esploro pri la deveno de la neologismoj en Esperanto. Tiujn ĉi malfeliĉajn vortojn oni jam delonge atakas, kvazaŭ ili estus ia fia enjeto en nian lingvon. Oni traktis ilin kiel nelegajn infanojn, kiel kapricajn ekpensojn kaj surgluaĵojn de individuoj. Sed efektive mi malkovris, ke la neologismoj havas tute decan genealogion kaj evoluis en la lingvo laŭ tiuj tute samaj (gis nun kaŝitaj) leĝoj, laŭ kiuj evoluis la origina vortaro de la lingvo.”

„Sed” mi intermetis „la origina vortaro ja ne evoluis! Ĝin elpensis Za—”.

„Bibilajo! Balasto! Fromaĝo!” kriis la profesoro. „Simpla herezo, kion vi diras. La baza Esperanta vortaro elkreskis laŭ leĝoj en si mem havataj, ne laŭ ia arbitra artifiko de sola homo! Rigardu tion” li aldonis, indikante la kartojn disjetitajn sur la tablo:

FIFORKULO

„Jen la deveno de la nomo de la insekto forfikulo! Simpla anagramo de ĝia priskribo: fi-forkulo. Unua principo: la principo de anagramismo! Laŭ tiu principo estas klare videbla, ke kokeriki estas koke krii, molusko estas nura muskolo, morfologio estas formo-logio, vaka devenas de kava, po devenas de op, tono de noto, kadro de krado, pilgrimi de pli migri kaj ĉe eco estas nur son-anagramo de esto: etso/esto — kaj ekzemple klareco estas simple klar-esto.

„Sed” mi dubis, „kiel tio validas por la neologismoj?”

„Nu” respondis Klapelkap, „prenu la neologismon aspra”.

„Jes, mi scias” mi intermetis; „ĝi estis proponita de Ka—”

„Balbutajo!” eksplodis la profesoro. „Simpla ĝi estas evoluajo el raspa, laŭ la anagrama principo! Tute tiel same, kiel falva devenas de flava”.

„Sed, kara profesoro” mi murmuris, „bonvolu pripensi, ke tiu via principo ne kondukas vin longen. Tiu besto, nun surmure, kiu tie ambblas krure”. Mi ekhaltis, timante, ke min fortrenos denove tiu tede batanta ritmo, kaj silente mi montris al la vigla forfikulo, kiu nun, marŝinte jam kelke da forfikulaj mejloj, rampas malsupren de la muro al la planko.

„Ha! Kion vi diras?” jetis la profesoro. „Ambblas krure? Unu momenton”. Liaj okuloj lumis distrite. Febre li ekkaptis la kartaron kaj literis:

KRURAMBLI

„Krurambli?” li grumbliis. „Ampli krure, ambli mure...”

Sed tiu frenezajo jam tedis min. „Bonan nokton, kara profesoro” mi diris, turnante min oscede al la pordo. „Kaj prosperon al viaj ento, pardonu, etimologiaj studoj! Dume bonvolu noti, ke tiu pomo de Newton, kiu batis revelacie vian kapon (kaj mi montris al la forfikulo) jam ne plu sur la muro ambblas”. Car la vigla besteto jam atingis la plankon.

„Halt! amiko” kriis Klapelkap per sufokita voĉo. „Io tralumas min kaj vi nepre devas ĉeesti la eventon. Ne sur la muro? Vere, la muro ne necesas por la ago”. Kaj el la literoj sur la tablo li forprenis M, U kaj R. Restis:

KR A BLI

„Krabli?” mi miris. „Sed ankaŭ tio estas neologismo—”

„— deveninta el krurambli sed la MUR, kio kondukas min al la dua neologisma principo — la principo de

Represo el la originala novelaro „El la Maniko”, kun aŭtoro permeso. Eldono en la Belliteratura Serio Stafeto de J. Régulo, La Laguna — Kanariaj Insuloj. Havebla ĉe via Libro-Servo.

signifaj ellasoj. Laŭ tiu principo la fundamenta vorto nubo sendube venis de nebulo (kun Ellaso de EL) kaj magra venas de malgrasa kun Ellaso de LAS. Siro devenas de sinjoro — kun ellaso de njo, ĉar njo ja ne konvenas en vironomo, kaj sambone oni povus diri sjoro kun ellaso de la same nekonforma in, remetante ĝin nur por la inoformo: sjorino. Kaj lanta...”

„Jes?” mi interesiĝis, ĉar ĉi tiu jam estas unu el miaj ŝatataj neologismoj, kaj mi volonte ekkonus ĝian legitimigon.

„Tute simple. Ĝi estas nur — fluanta sen flu!” aŭ, se vi preferas, sen uf!

„Kaj kion, volu afable diri, signifas sen uf aŭ sen fu?”

Li rigardis min malestime. „Interjekcioj” li respondis. Uf! estas peno, fu! estas laciĝo.”

„Sekve lanta estas fluanta sen po?” Nu, ankaŭ tio ne estas malebla. Kaj kiujn aliajn neologismojn vi legitimas per tiu principo?”

„Pigra” li respondis. „Miaj historiaj esploroj rivelas, ke ĝi devenas de pilgrima. Pilgrimo ja estas tre maldiligenta vojaĝo — ofte pura libertempo kaj laborevito! Do pilgrima homo estas homo mallaborema, kaj pigra estas pilgrima — sen lim!”

„Korpo de porko, ne!” mi protestis. „Tio estas jam tro alpensita! Ke pigro estas mallongigo de pilgrimo, tio estas, ni diru, iomete ebla, sed ke la eljetita parto havas ian signifon...”

„Laŭplaĉe!” diris la profesoro, foliante en siaj paperoj. „Ĝi ankaŭ povas esti simpla mallongigo aŭ kuntiritita formo, kiel — jen!” (li jam trovis la koncernan folion) — rezulto el rezultato, sponto el spontanea, damni el kondamni, stado el stadio kaj taĉmento el la netrovebla sed nepre induktebla formo detaĉmento! En la lomo de tiu principo ni ekvidas, ke stringi str(e)ngi, trista tr(opsim)ista, gracila estas graci(ta)l(i)a, giri g(avot)iri, febla f(alig)ebila, enorma e(kster)norma, rufa estas ru(ĝ)f(lav)a, frida estas fr(ostrig)ida kaj retreto estas retr(oimp)eto!”

„Kaj klami estas aklami kaj plaŭdi estas aplaŭdi!” mi kriis.

„Jen kiel impetulo ensaltas en la sciencon kaj ĉion fluge solvas!” respondis acide la profesoro. „Klami ja devenas de aklami, sed ĉe plaŭdi kaj aplaŭdi la procezo estas inversa, tio estas aplaŭdi estis kromlitera formo de aplaŭdi...”

„Kromlitera formo? Ĉu tio estas eble ankoraŭ alia principo?” mi demandis subtilakre, ĉar min jam inci-

tis la dekretema maniero de la maljuna azeno.

„La kvara” li tabelis. Laŭ ĝi amara (gusto) devenas de mara (gusto), sombra venas de ombra, vigili de vigli, brutala de bruta kaj negi de nei. Krome havas ioman funkcion la literŝanĝaj formoj. Tiuj jam estas sufiĉe konataj: pezi kaj pesi, kompromisi kaj kompromiti, organo kaj orgeno, ktp.

„He!” mi interrompis. „En kian labirinton vi vadas kun viaj kvara kaj kvina principoj! Tiaj principoj ne ekzistas. Ĉiuj ĉi ekzemploj estas simple anagramoj.”

„Kiaj anagramoj! li grakis. Plaŭdi kaj aplaŭdi — ili havas malsaman nombron da literoj, do anagramo ne eblas.”

„Sed jes! Tiuj (laŭ vi) kromliteraj formoj estas nur speciala kazo, kie la nova radiko estas anagramo de la tuta vorto: aplaŭd — plaŭda; amara — mara; vigili — vigli. Aŭ ĉe inverse: negi — anagramo de neig, kaj klama el aklam!”

„Hm, hm” li grumbliis, evidente embarasita. „Kaj kio pri brutala?”

„Nu, jam la idistoj havis klarigon por tio” mi atentigis. Brutala signifas konvena al bruto.

Mia spirito, antaŭe premita per la masiva pezo de lia dekretado, komencis gaje leviĝi. „Kaj viaj literŝanĝaj formoj! Tio simple estas anagramo, kiu liveras vorton de alia gramatika speco; ekzemple sombra — ombra. Hopla! mi demonstris triumfe.

„Kaj orgeno? — kaj kompromiti?” la profesoro provokis.

Sed la aplombo jam spiris en mian velon kaj mi veturis senĝene antaŭen. Mi svingis la manon. „Infanludo! Orgena — organe: kompromitis — kompromisiti” mi orakolis facilanime.

„Ba” li grumbliis. „Jen bela simpligo, kiu faras tiajn jonglojn. Do ĉio tio estas nur anagramo?”

„Krom viaj streĉitaj formoj” mi koncedis liberele.

La formo de la profesoro kvazaŭ ŝrumpis, poste li ek-svelis ĉe nova penso kaj rebatis elaste:

„Do kion vi diras pri la retroformoj?”

„La ret-retroformoj?” mi balbutis. „Jes!” li insistis, kun dolĉe-acida rikano. „Ekzemple geli el degeli. Se oni komprenas en degeli la prefikson de (kun kvazaŭ mal-a signifo) tiam degeli povas signifi de-frosti kaj ni retroformas el tio gelo — frostito. Similaj retroformoj estas la fundamentaj edzo kaj edzino, fraŭlo el fraŭlino, kuzo el kuzino. Similaj estas spekti el spektatoro, gimnasto el gimnastiko, kompanio el kompanio (analoge al kolego — kolegio). Oni povas eĉ antaŭvidi pluajn retroformojn en Esperanto: somnambi el somnambulo kaj kandidi el kandidato.”

Mi spirĝemis. Mi jam perdis la o-

fensivon kaj verŝajne devos denove aŭskultadi la lampoleajn teoriojn de la maljuna kapro. Mi eksentis lacon, mia kapo zumis kaj mi tre volis trovi freŝan aeron.

Horloĝo batis la dekduan kaj en la nokto tenorkato ekserenadis. Mi ocedis. „Koran dankon, mia olda amiko” mi diris, adiaŭante. Sed li vigle interrompis min.

„Olda?” li kriis. „Plena fuŝformo! Ĝi respondas al neniu el la evolu-principoj kaj estas nepre kripla. Nomu min maljuna se vi volas, sed olda nepre ne!”

„Sed, kara mia,” mi respondis. „Se via teorio ne povas klarigi kiel olda venis en la lingvon, tio ne signifas, ke ĉi tiu vorto estas fuŝforma. Eble temas pri tio, ke via analizo ankoraŭ ne estas kompleta...”

„Rilate al olda ĝi estas jam kompleta” pretendis Klapelkap. „Mi nomas ĝin fuŝforma, ĉar ĝi devenis el preseraro en iu Esperanta manuskripto. Nu „li aldonis, gestante al mi silenton,” la manuskripto mi ankoraŭ ne trovis, sed mi scias, kion ĝi enhavas. Kiel? Nu, kiel ne? Ni ne posedas la femuron de la Java prahomo, tamen ni scias kiajn femurojn li havis. Kaj tiu ĉi olda certe venis de iu frazo tre simila al la jena, en perditita artikolo pri la juna Zamenhof.”

„Efektive, Ludoviko enhavis en sia naturo pli da Sefer (la patrin-familio) ol da Zamenhof.”

„Kaj la preseraro konsistis en tio, ke oni presigis ol da dufoje (eble ĉe la piedo de unu paĝo kaj denove ĉe

la kapo de la sekvanta), kaj poste iu, legante la fuŝitan frazon:

„Efektive, Ludoviko enhavis en sia naturo pli da Sefer ol da ol da Zamenhof”

— tuĵ konkludis, ke ol-da signifas „maljuna”, kaj tiel la eraro estis lanĉita!”

„Interese” mi murmuris. Kaj ĉu vi konstatis ankoraŭ aliajn fuŝformojn?”

„Nu, retro” li diris, — kvankam mi mem uzas ĝin (ĉar ĉe erarajo sanktiĝas pro la voĉo de l' popolo, t.e. la komuna uzo). Evidente ĝi estas kuntirita formo de returne kaj devus esti retre! Kaj prompta estas formo tute senbezona, ĉar ni jam havas bonan neologismon insta...”

„Insta?” mi diris. „Mi neniam vidis ĝin”.

„Ĝi estas retroformo el instigi” klarigis la profesoro. „Instigi do signifas fari insta aŭ se vi nepre volas, li aldonis kun grimaco „fari prompta, tujaga, fervora...”

Lia voĉo formurmuris kaj distrite li ekprenis la Lexicon-kartojn kaj komencis ilin „plekti”. Lante li faligis kvin kartojn. Ili faris la vorton TURPA. Medite li rigardis ilin kaj hezite revicigis ilin je PRUTA. Li forprenis la P kaj anstataŭigis per B, farante BRUTA; sed mi, timante la eksplodon de ankoraŭ iu alia principo de la neologismo, mallaŭte elŝteligis en la nokton.

Listo de la neologismoj — laŭvice menciitaj — de la supra ŝerco aperos en la venonta numero.



La Verviersa grupo de R.B.L.E. (Belg.) organis sukcesplenan pablikan ekspozicion pri Esperanto. Jen bildo de la blindulo stando kun nia blindulo-samideano Koeune kiu montras afiŝon: „La blinduloj vidis klare; ili lernas Esperanton”. Gratulojn al la organizintoj!

UEA-Oficejo

Ek de la 15-a de novembro ĝi estis transportita al nova adreso en Nederlando, nome:

**UEA, Eendrachtsweg 7,
Rotterdam C.**

Ĉion, antaŭsenditan al Heronsgate, de nun direktu al la supra adreso.

Aliflanke oni bonvolu noti la novan adreson de la CENTRO DE ESPLO-RO KAJ DOKUMENTADO kaj de la GENERALA SEKRETERIEJO:

**77, Grasmere Avenue
WEMBLEY - Medlesex
(England)**

Ĉiuj leteroj, kiuj rilatas al informado, eksteraj rilatoj kaj la aliaj taskoj de la ĝenerala sekretario, estu sendataj al tiu ĉi adreso.

(Sekvo de paĝo 67)

Verda Stelo" paroladon, la prezidanto devis lin anstataŭi, pro daŭra raukeco de la voĉo.

Nur per operacio, la malsanulo povis esperi plibonigon. Tiu operacio okazis kaj ni kuni ĝojo povas diri ke nia malnova amiko Jan Jacobs jam reprenis, almenaŭ parte, sian bonvolan laboron sur la tereno de la bestprotektado kaj ni esperas ke li ankaŭ iom poste, povos repensi pri parolado en la esperanta grupo.

Funebro

Ni prezentas miajn sincerajn kondolencojn al S-ro A. Verduyssen, okaze de la morto de lia bedaŭrata fratino.

..

Ni ankaŭ prezentas samajn kondolencojn al S-ro Th. Van Gindertaelen, administranto de la Ligo, pro la morto de bofratino kaj onklino.

BRUGO

Bruga Grupo Esperantista

(Poŝtĉeknumero: 4835.33)

La 30-an de aŭgusto, F-ino M. Willems interesplene raportis pri sia vojaĝo al Germanujo.

La 5-an de septembro, post leciono de la perfektiga kurso, portretludado agrabligis la lastan parton de la kunveno.

Nova elementa kurso komenciĝis la 13-an de septembro, sub gvidado de la prezidanto, S-ro Ch. Poupeye. Dek-kvar novuloj sin enskribigis. Post la leciono, okazis reciproka prezentado kaj interkonatiĝo inter la novaj ĝenerantoj kaj la malnovaj gemembroj.

La sekvanta leciono estis donata la 20-an

de septembro, post kiu aranĝoj estis farataj por la balo de la 15-a de oktobro kaj kelkaj diskoj, pruntedonitaj de S-ro W. Van Werveke, estis disaŭdigataj.

Dimanĉon, 25-an de septembro, multaj gemembroj vizitis ope du artajn ekspoziciojn: unue, tiun de samgrupanino S-ino S. Verbeke-Vandenberghe en Artgalerio „Mem-linc", kie la prezidanto, nome de ĉiuj, esprimis sincerajn gratulojn al la artistino pro siaj valoraj verkoj: due, tiun de re-produktajtoj de pentraĵoj: „De la Primitivoj ĝis 1860" organizitan de la „Willems-fonds", sekcio de Bruĝo, sub la aŭspicoj de Unesko kaj de la Servo por Popolklerigado de la Ministerio por Publika Instruado.

La dua parto de la kunvenoj de la 27-a de septembro kaj de la 4-a de oktobro, post la ĉiusemajnaj lecionoj, estis dediĉata al detala organizo de la balo de la 15-a de oktobro.

La 11-an de oktobro: plia leciono de la elementa kurso, fidele sekvata de la enskribigintoj, post kio S-ro Karlo Poupeye (filo) raportis pri la antaŭtaga kunveno de la Brusela Grupo, dum kiu paroladis D-ro Shinoda al Japanujo, kaj al kiu ĉeestis tri gemembroj de la Bruĝa Grupo. Por kroni tiun interesplenan vesperon, S-ino S. Verbeke-Vandenberghe antaŭlegis pri sia vojaĝo al Bretonujo, kiun ŝi priskribis kun vera elvoka talento de pentristino.

La granda evento de la sezono restis la grupa balo, kiu okazis la 15-an de oktobro en la salonego „Concordia": multnombra publiko kaj neestingebla entuziasmo ĝis la „malgrandaj horetoj". La kotiljono „La lumigantaj floroj" belege impresis kaj estis longe aplaudata. La entrepreno de tiu balo estis iom riska, pro nova pli granda kaj pli luksa ejo, sed la sukceso larĝe superigis tiun de ĉiuj antaŭaj grupaj dancfestoj.

Pri tiu balo estis vigle raportata dum la kunveno de la 18-a de oktobro. La prezidanto dankis ĉiujn kunlaborintojn: la vendintojn de kartoj kaj speciale S-ron L. Van Wassenhove, kiu iniciatis la sukcesantan kotiljonon kaj, malavare pri mono kaj laboro fabrikis kun siaj ĝehelpantoj, la belaspektajn kotiljonojn. Poste la komitato decidis a rangi grupan vespermanĝon por lundo 31-an de oktobro kaj jam de nun fiksas la daton de la dua vintra balo je la 2-5-a de februaro en la sama salonego.

La 25-an de oktobro, post la leciono horo, la kunveno, ĉeestata de trideko da gemembroj, ĉefe estis dediĉata al organizo de estontaj programoj.

Dimanĉon, 30-an, antaŭtagmeze, okazis grupa vizito al du artaj akcepticioj: unue en artgalerio Memlinc, kie samgrupanino, F-ino Andrée Algrain, profesia artpentris-

BRUGGE

BRUGES

Hôtel du Cornet d'Or

2, Simon Stevinplaats, 2

Centra situo - Moderaj prezoj

Moderna komforto

Sidejo de „Bruga Grupo Esperantista."

Tel. 314.59

tino, denove elmontris aron el siaj plej belaj verkoj pentraj kaj skulptaj: due en la Provinca Palaco, kie estis elmontrataj multnombraj pentraĵoj kaj skulptaĵoj prezentitaj al la provinca konkurso.

Programo de la sekvontaj kunvenoj:

Ordinara kunveno ĉiumarde je la 20a en sidejo „Gouden Hoorn — Cornet d'Or". Simon Stevinplaats 2, Tel. No. 314.59.

Decembro: 6an: a) leciono: b) okaze de la Sta Nikolao-festo: Surpriza vespero: Ĉiu alportu nekonatan surprizon!

13an: a) leciono: b) parolata gazeto.

20an: a) lasta leciono de la elementa kurso: b) parolado de S-ino S. Verbeke-Vandenberghe, pri „Historio de Esperanto."

27an: Lasta kunveno de la jaro: Lerna-do de kantoj.

BRUSELO

Esperantista Brusela Grupo

(Poŝtĉeknumero: 1230.48)

La 3-an de oktobro, okazis la Parolata Ĵurnalo, kies premion akiris S-ro Castel kun „Pri San Marino Respubliko".

La 10-an, la grupo havis la honoron akcepti D-ron Shinoda el Japanujo. Li rakontis sian vojaĝon tra Usono: kaj parolis pri la importita egipta planto „Kartamo" spico de kardo el kiu la japanoj uzas la eltirajon de la sekita floro kiel liporuĝaĵo.

D-ro Shinoda parolante montris belegajn lumbildojn: pri la „Kartamo"; pri lia familio, pri pluraj sanktejoj, kaj pri tipaj japa-

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel.: 15.19.92

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°

LA LOUVIERE

S.P.R.L.

Tel. n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtubuloj; KATOKULO, por signalvitroj.

naj pentraĵoj. D-ro Shinoda donacis al kelkaj membroj semojn de Kartamo.

La 17-an, S-ro Vanderstempel donis sian perfektigan kurson. Li pritraktis la prefiksojn ebl, ist, ind, ig, ig um, kaj la sufiksojn aĉ, fi, ge-j, mis, dis.

La 23-an: La grupo vizitis la „Planetarium" kie oni povas admiri la Stelarojn de la Granda ĉaro, Persee, Orion, Leono Virgo ktp. Ni ricevis ankaŭ klarigojn pri la estonta artefarita satelito...kun la aritmetikaj formuloj.

La 24-an. S-ro Castel estis la laŭreato de la parolata ĵurnalo kun 136 poentoj: li legis la tekston, kiu akiris, dum la jaro la plej multon de la poentoj: „Ekrigardo al Japanujo".

F-ino Kestens estis festata por sia plej regula ĉeestado: 46 fojoj. La prezidanto alparolis ambaŭ. La vicprezidantino kisis lin, la kasisto sin! Oni dancis poste.

Programo de la sekvontaj kunsidoj:

Novembro: (memorige) la 7an: Parolata Ĵurnalo: la 14an: S-ino Daems „Historio de la Muziko"; la 20an: Jara festeno honore de F-ino Kestens en Restoracio „Concordia-Nord"; la 21an: Perfektiga kurso de S-ro Van der Stempel; la 28an: S-ino Weyn prezentas amuzan vesperon.

Decembro: la 5an: Parolata Ĵurnalo: la 12-an: Zamenhofa Vespero; la 19an: Perfektiga Kurso de S-ro Van der Stempel; la 26an: Kristnaska festo.

Januaro: Ni anoncu, krom la parolata ĵurnalo de la 2a kaj la Perfektiga leciono de la 16a, ke okazos la 23an, en la kadro de la Mozart-memorigo, parolado de S-ino Ernst pri la granda komponisto.

LIEĜO

„Lieĝa Grupo Esperantista"

Sub la aŭspicoj de Lieĝa Grupo Esperantista, malfermiĝis mardon, la 18-an de oktobro, je la 18a h. 30, elementa kurso, kiun gvidas nia vicprezidanto-kasisto S-ro Joseph Sœur kaj kiu altiris belan klason.

Tiu ĉi kurso okazas en la Lernejo de Superaĵ Kursoj de Fremdaj Lingvoj, Boulevard de la Sauveniere 131, en Lieĝo.

Vendredon, la 21-an de oktobro je la 20a okazis, en la salono de „Café du Stade" rue Sylvestre, en Lieĝo, propaganda parolado pri Esperanto, kiun akceptis doni la fervora propagandisto D-ro P. Denoël.

ANONCO

Veraj Amulet-rememorigaĵoj de Afriko. Nun estas haveblaj en malgranda kvanto amuletoj, kiuj vere protektas vin kaj donas al vi bon-sorton, se vi kredas je tio. Unu vera specimeno kaj la sendado rekte al vi kostas entute nur 35 fr. Aĉetu hodiaŭ, kiam ili ankoraŭ estas aĉeteblaj — ĉe L. Heilberg, Poste Restante, Kitwe, Northern Rhodesia.

Anoncoj

Juna turkdevena, 26-jara, Esperantisto (instruisto) deziras korespondi kun flandroj pri historio, ekonomio, sociologio kaj aliaj temoj: Halil Kasimov, *Sveštari*, Ispersko (Bulgarujo).

LISTO LE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

Antverpeno

In 't Duifken (S-ano Paesmans), Lge Koepoortstr. 64: Kostumoj (5 0/0 rab.)
Vino Max Bolsius, Diepestraat 58-60, Antverpeno: Kuirejlaro. Tel. 32.57.85
M. Philips, Karel Rogierstr. 1, Antverpeno. Korsetoj - Rab. 5-10% por la membroj.
P. van der Hoydonck-van den Buys, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg. Ŝuoj — Teksajoj — Merceraĵoj. Tel. 74.27.86
J. Montmirail, Kortemarktstraat 53, Berchem. Arĥitekto. Tel. 39.58.66
Morris de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Hemiaĵoj. Tel. 39.17.09
Henny de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Privataj lecionoj
Roger Jaumotte, Cyriel Buyssestr. 44, Antv. Anoncoj en tagĵurnaloj. Tel. 37.47.14
K. Amerijckx, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07
B. Vanistendael, Dambruggestraat 234, Antverpeno. Okulvitroj — Rab. 5 0/0
CL. Peeters, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo. Tel. 35.40.67
L. Van Reybrouck, Venusstraat 33, Antverpeno: ĉiŝp. iloĵ por la hejmo. Tel. 32.43.88
Firmo van Iseghem & Verstraeten, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken. Vitraĵoj — Speguloj — Tel. 37.88.20
J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto. Tel. 39.55.81
J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Aŭtoĉar-ekspluado. Tel. 39.20.59
H. Peeters, Vordensteistr. 58, Schoten. Ingen.: Neon-lumo, Reklamoj. T. 81.48.47
H. Jacques, Lange Beeldekenstraat 31, Antverpeno. Presaĵoj. Tel. 33.75.38
Verdijk, St. Rochusstraat 174, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07
P. Peelman, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumaĵoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55
Y. Amerijckx, Helmstraat 154, Borgerhout. Peltaĵoj
M. Blajwas, Simonsstraat 40, Antverpeno. Frizisto. Tel. 32.13.18
S-ro A. Van den Neste, Deurnebaar 30, Merksem. Presad-inkoj. Tel. 45.78.59

KOMERCISTOJ kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamojn en siaj butikoj

G. Baeten, Belpairestraat 53, Berchem. Tel. 39.22.81. Frizisto por sinjorinoj
„De Boerinekens" (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo
A. Roels, Montignystraat 155, Antverpeno. Ledaj artikloj-Selisto. Tel. 37.14.07
G. Goemacore, P. Genardstraat 39, Antverpeno. Speciejo, laktejo
Vandersmissen, Kampioenstr. 11, Antverpeno. Paperaĵoj, parfumaĵoj
Van Kerkhoven, Grote steenweg 63, Berchem. Fornoj; forĝaĵoj
R. Scheerdijk, Oude Vaartplaats 34, Antverpeno. Ŝnuroj; lignaj ŝuoj; lanternoj
gardenilaro
Butiko Angora, (galerio), Huidevettersstr. Antverpeno. Luksaj pantofloj, sportŝuoj
Librejo Schuttershof, Schuttershofstr. 36, Antv.: luo, aĉeto, vendo de libroj
Vojag-agentejo Pier Busseti, Hopland 5, Antv.: privataj kaj grupvojaĝoj

Bruselo

Farmaciisto Jacobs, 94, rue général Eenens Bruxelles 3 15.26.01
Farmaciisto N. Nells, Meise 59.13.73
„BONBONS SWINNE", 77, rue de Nieuwenhove 44.57.36
Imprimerie Lielens, 18, rue de la Princesse 21.10.98
CARRELAGE „Carrart", 19, avenue de Saxe 21.74.49
Viajn MEBLOJN ĉe S-ro Weyn, aĉetu rue Destouvelles, 57 15.96.97
Libroj, Publikajoj, ĵurnaloj, F-ino Kestens 24, rue Bodenbroeck 11.71.03
Tinkturejo, senmakuligejo „DEX" 16, rue Esnest Laude 15.28.29

Svislando en roma tempo

de D-ro A. Baur

Svislando estis en antikva tempo parto de la roma imperio kaj komplete akceptis la roman kulturon. Ĝiaj ĉefaj enloĝantoj en la tempo de la roma konkero estis okcidente la keltaj gento de la helvetoj kaj en la oriento la ilira gento de la retoj. Pro la premo de la ĝermanoj en oriento la helvetoj decidis elmigri en sudan Francujon, kaj en 58 a.k. la tuta popolo, 360.000 homoj forbruliginte siajn urbojn kaj vilaĝojn, ekmovis sin en Galion, do la hodiaŭan Francion. Tiun elmigran igit malsukceso la ĝenia roma militestro Julius Caesar, tiam ĉefo de la Narbona provinco, t.e. sudorienta parto de Francujo, kiu tiam jam apartenis al Romo. En terura batalo ĉe Bibracte, hodiaŭa Antun, li haltigis la helvetojn kaj devigis ilin reiri en Svislandon kaj rekonstrui siajn domojn. Li traktis ilin kun indulgo kaj donis al ili la staton de romaj aliancanoj, foederati, ĉar estis grave por li, ke ili malhelpu la invadon de la germanoj kaj protektu tiamaniero Galion, kiun tiam Caesar konkeris komplete por Romo. La helveta regiono farigis parto de la belga provinco, do tiam Svislando kun norda Francujo kaj hodiaŭa Belgio formis unu tuton. Valezon Caesar ne sukcesis konkeri kaj Retion li eĉ ne provis, sed en 15 a.k. ankaŭ Retio kaj Valezo estis submetitaj al Romo, kiu per tio ekhavis la posedon de la gravaj alpaĵaj pasejoj. La romanoj konstruis gravajn stratojn trans la alpojn, la ĉefaj estis la granda sankta Bernharde en Valezo kaj la Julio en Grizono. En Nyon apud la lago de Genevo kaj en Augusta Raurica apud Basel tuj post la subigo per Cezaro, kiu mem neniam eniris Svislandon, la romanoj konstruis du koloniajn urbojn. En Vindonissa apud Burgg, ĉe la kunfluo de Aare, Reuss kaj Limmat ili starigis grandan kampejon, kie restadis unu legio, t.e. entute 11.000 soldatoj kun sia trajno. Grave estas konsci ke la romanoj neniam okupis Svislandon kiel konkerantoj. Krom la legio en Vindonissa, kiu cetere de 101-260 p.K. ne plu estis tie, ĉar tiam la roma limo estis pli norde en Germanujo, nur unuopaj romanoj kiel altaj oficistoj, negocistoj kaj privatuloj vivadis en Svislando, la popolo restis la keltaj helvetoj. Tiuj tre volonte adoptis la romajn kulturon kaj lingvon, kvankam Romo neniam subpremis la keltan lingvon, sed la roma kulturo estis tiel supera kaj ligita kun altiĝanta vivstandardo, ke la helvetoj same kiel la keltoj en Galio estis tre emaj lerni la latinajn lingvon, arton kaj arkitekturon. La iama helveta ĉefurbo Aventicum, proksime de Münchenwiler kaj Murten,

tute en la centro de Svislando ekfloris mirinde en la unua kaj dua jarcento p.K. kaj posedis samkiel Nyon kaj Augusta Raurica belegan teatron, templojn, banejojn kaj riĉe ornamitajn, luksajn aliajn publikajn kaj privatajn domojn. Ankaŭ aliaj lokoj kiel Martigny, Lausanne, Genevo evoluis tre bele. En 259 p.K. la alemanoj sukcesis unuafoje invadi Svislandon kaj eĉ bruligi Aventicum, sed la imperiestro Diocletianus 285-305 restarigis la ordon. En la kvara jarcento oni konstruis multajn kastelojn en Svislando, la plej bele konservita estas tiu de Irgenhausen, kaj laŭlonge de la Rejno vicon de turoj kaj foritkajoj. Tamen en 401 ĉiuj romaj trupoj estis bezonataj en Italujo mem pro la invado de la gotoj kaj Svislando restis senprotektita. Tiam komencis la invado de la alemanoj, kiuj venis kiel konkerantoj. Ili konstruis siajn proprajn vilaĝojn kaj donis al norda Svislando ĝian germanan karakteron. En okcidento ekloĝis la ĝermana tribo de la Burgundoj, sed ili intermiksiĝis kaj asimiliĝis kun la enloĝantoj kaj akceptis ilian latinan lingvon, t.e. la hodiaŭ france parolantaj svisoj, kaj en la orientaj alpoj konservis la retoj ĝis hodiaŭ sian, kompreneble vulgariĝintan latinan lingvon, t.e. la retoromanĉa. En la svisa tero troviĝas sennombraj postrestaĵoj el la roma tempo, kiujn oni hodiaŭ zorge elfosas, konservas kaj admiras.

(Resumo de prelego en Münchenwiler, okaze de la E-ferio-kursoj).

La Skalo de Beaufort

En Nederlando ĉiam ventas kaj ne malforte ventegas.

Tamen oni aŭdas multajn diversajn nomojn por la vento.

Se ni havas moderan venton, iu kiu ne vivas en ventoplana lando nomos ĝin ŝtormo.

En la meteorologio, marveturado k.s. oni uzas la internacian sistemon de Beaufort, kiu indikas ĉiujn ventojn per numero. Jen tiu Skalo de Beaufort. Atentu bone la diferencon inter „ventego” kaj „ŝtormo.”

- | | | | |
|---|------------|----------------------------------|------------|
| 0 | Kvieto | La fumo iras rekte alten | 0-0,5 m. |
| 1 | malforteta | la fumo iom moviĝas | 0,6-1,7 m. |
| 2 | malforta | folioj bruetas, sentebla | 1,8-3,3 m. |
| 3 | modereta | flagoj ekflirtas | 3,4-5,2 m. |
| 4 | modera | polvo kaj papero moviĝas | 3,5-7,4 m. |
| 5 | forta | Brancetoj ŝvingiĝas, ondoj tufas | 7,5-9,8 m. |

SAT-KONGRESO EN LINZ

La 28-a Kongreso de S.A.T. (Sennacieca Asocio Tutmonda) en LINZ, Aŭstrio, de 6-12 aŭgusto, kunvenigis 615 gepartoprenantojn el 18 landoj. La Kongreso solvis en tri laborkunsidoj harmonie kaj optimisme la demandojn, kiujn starigas antaŭ la Asocio la nuntempe levigantaj problemoj. La Gvidrezolucio spegulas tiun laboron, substrekante la signifon de nia venontjara kongreso en la urbo Beogrado kaj akcentante nian deziron, ke la tutmonda evoluo konduku al rekontakto kun amikoj, kiuj nun estas disigitaj de ni.

Kvin prelegoj de la Laborista Universitato pri diversaj temoj trovis atentan aŭskultantaron. Ĉe la Malferma Soleno elstaris du gravaj alparoloj, tiu de la prezidanto de SAT, k-do Bannier kaj tiu de la Viena ĉefurbestro, k-do Jonas.

Por la publiko neesperantista estis vizitebla impona ekspozicio, pri kiu ankaŭ la loka gazetaro menciis. Krome la publiko estis allasata al la dimanĉa Kultura Vespero, en kiu la urba orkestro prezentis plej belajn melodiojn de aŭstraj operetkomponistoj.

En la Adiaŭa Vespero kunlaboris la geknabaro, kies aparta kongreseto (la Dua Geknabo Kongreso) unuigis en ludo kaj seriozo 45 infanojn el multaj landoj.

La duontaga ekskurso sur Danuba ŝipo al Neuhaus iom suferis pro la pluva vetero, kvankam ĉi tiu ne povis venki la bonan humoron de la kunveturantoj. En sia tuttaga ekskurso la kongresanoj ne nur ĝuis la belegajn de la naturo en Salzkammergut, sed ankaŭ faris propagandan laboron: ja okazis akcepto ĉe la urbestroj de Gmunden kaj Lenzing.

- | | | | |
|----|-----------|---------------------------------------|--------------|
| 6 | fortega | telegrafdratoj kantas, ombreloj tiras | 9,9-12,4 m. |
| 7 | ventegema | arboj sin movas, irado preskaŭ neebla | 12,5-15,2 m. |
| 8 | ventego | vento rompas branĉojn | 15,3-18,2 m. |
| 9 | ŝtormo | elsiras tegolojn kaj kafenokapojn | 18,3-21,5 m. |
| 10 | potenca | ŝtormo elradikigas arbojn | 21,6-25,1 m. |
| 11 | ŝtormego | detruoj | 25,2-29,0 m. |
| 12 | uragano | katastrofa | pli ol 29 m. |

Inter la nederlanda „storm”, la angla „storm” kaj la esperanta „ŝtormo” estas diferenco.

La angla „storm” = ŝtormego (11), la angla „gale” = 7, 8 la nederlanda „storm” = 9.

Ankaŭ por la stato de la maro kaj la ondado ekzistas tiaj skaloj.

K. Ruig.